

ESPERANTO

TRIUMFONTO

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekkonto Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.

Redaktoro:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Kunredaktoroj: J. Fejthke, H. Hurler, Max Butin.
Literatura red.: Zanoni.

Kunlaborantoj inter la Esperantistaro de la tutmondo.

Semajna

Abonon ni akceptas ne por fiksa tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝinta abonon ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, Germanioj abonon ĉe sia poŝtoficejo.

Kun senpaga monata „Revuo“

La prezo de unu numero estas por la landoj:
Aŭstra 800 Kr. Ĉeĥosl. 1.20 Kr. Hungara 80 Kr. Nederl. 0.15 Hfl. Rusa 40 Gmk.
Belga 0.50 Fk. Finna 1.20 Fmk. Itala 0.70 Lir. Norvega 0.30 Kr. Sveda 0.24 Kr.
Brita 3/4 Pc. Franca 0.50 Fk. Japana 0.10 Jen. Pola 120 Mk. Svisa 0.50 Fk.
Bulgara 3 Levul. Germana 80 Mk. Jugosl. 1.60 Din. Portug. 0.50 Esk. U. S. A. 0.06 Dol.
Dana 0.30 Kr. Hispana 0.30 Pes. Kanada 0.06 Dol. Rumana 3 Lei.
Baltikanoj demandu la prezon ĉe sia Abonejo. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.50 Fr. Fk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Neŭtrala

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 4. Por Adressangoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto. Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 avisan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 40 gmk.); rabato laŭ interkonsento.

Varbu anoncojn
(nur komercajn aŭ industriajn)
por ĉi tiu kadro!
Demandu specialajn prezojn!

Numero 113 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 3. Decembro 1922.

Lingva Komitato.

Cirkulero de la Prezidanto al la L.K.-anoj.
Paris, 5. Nov. 1922.

Kara Kolego,

Mi sendas al vi:

- La rezultaton de la voĉdonado de la L.-Komitatanoj:
 - pri Landnomoj,
 - pri la kreado de Akademianj Korespondantoj.
- La plenan liston de la nunaj L.-Komitatanoj.

Voĉdonado pri Landnomoj.

Post raporto de Prof. Grosjean-Maupin la Akademio, flankenmetante aliajn proponitajn solvojn, al la demando: „Ĉu konsilinda la simpla fideleco al la Fundamenta kaj tradicia -uj?“ respondis: 9 jes, 2 ne, 1 duba voĉdono.

Al la demando: „Ĉu vi aprobas la fidelan sintendon de la Akademio en la landnoma demando?“ respondis 87 L.-K.-anoj.

74 (2 kun rezervoj)	Jes
5	ne
2	dubaj voĉoj
6	sin detenis de voĉdono.

Voĉdonado pri kreado de Akademianj Korespondantoj.

Al la demando: „Ĉu vi aprobas la kreadon de Akademianj Korespondantoj kaj rajtigas la Akademion elektii, se bezone, eĉ ne L.-K.-anojn?“ respondis 87 L.-K.-anoj.

72	Jes
8 (kondiĉe ke ili estu aŭ fariĝu L.-K.-anoj)	Jes
1	ne
6	sin detenis de voĉdono.

Sekve al nia Regularo estos aldonata jena paragrafo XII, 21 (in fine):

„La Akademio havas la rajton elektii, eĉ ekster la L. K., se bezone, Akademianj korespondantojn — se ili ne estas jam L.-K.-anoj, la Akademio petas de la L. K. aprobon, dank' al kiu ili fariĝos L.-K.-anoj. — Ilia nombro ne devas superi la trionon de la nombro de la Akademianoj.“

Nunaj Lingva-Komitatoj.

(La nomoj de la Akademianoj estas distingitaj.)
Arnhold (Dr. H.), Tiergartenstr. 52, Dresden, Germ.
Aymonier (Cam.), Rue Ernest Cresson, Paris, Francujo.

Backheuser (L.), Escola Politeknika, Rio de Janeiro, Brazilo.

Bastien (M.), Rue de Vendenheim 7, Strasbourg, Francujo.

Behrendt (A.), Hohenstaufenstr. 24, Berlin W, Germ.

Bianchini (J.), Prado, Clausetto, Udine, Italujo.

Blaise (S-ino M.), Casile Way 10, Hanworth, Middlesex, Anglujo.

Bobin (M.), Rue Vital 21, Paris 16-e, Francujo.

Boucon (H.), Boul-d du Lycée 10, Annecy, H-te Savoie, Francujo.

Bremon y Masgrau, Brue 46, Barcelona, Hispan.

Bulthuis (H. J.), Daguerrestr. 84, Hago, Holando.

Bünemann (O.), Alsterkrughaussee 586, Hamburg, Fuhlsbüttel, Germanujo.

Busuttill (S-o G.), Slienza, Malta.

Butler (Montagnu C.), Hart Str. 17, London W.C., Anglujo.

Cart (Th.), Rue Soufflot 12, Paris V, Francujo.

Chavel (G.), Rue Caulaincourt 57, Paris, Franc.

Christaller (P.), Weinsteg 61, Stuttgart, Germ.

Codorniu (R.), Malecon 6, Murcia, Hispanujo.

Corret (D-ro P.), Boul-d de la République 19, Versailles, Francujo.

Couto Fernandez (A.), Lavanjeiras 225, Rio de Janeiro, Brazilo.

Degon (P.), Rue Perronet 54, Neuilly s. Seine, Francujo.

Delvaux (L.), Boul-d Joseph II. 10, Charleroi, Belg.

Dombrowski (A.), Gr. Vilnastr. 34, Kaunas Litov.

Fischer (H.), Alea Suter 19, Bukarest, Rumanujo.

Flourens (S-ino Rokzano), Cours Joseph Thierry 43, Marseille, Francujo.

Fridöri (H.), Schaffhauserstr. 15, Zürich, Svisujo.

Furtado (Mur.), C-al Vicente 38, Porto Alegre, Brazilo.


Ghez (A.), Supera Poŝtdirekcio, Trieste, Italujo.

Grau-Cazas (J.), Str. Villarreal 136, Barcelona, Hispanujo.

Ligo de Nacioj.

Nigra Delegitaro.
(Kun bildo)

Estis en Genève kvarmembra delegitaro de la 3-a Internacia Nigra Kongreso, okazinta lasttempe en New-York Demandite pri la celo de lia vojaĝo, la ĉefo de la delegitaro, s-o G.O. Marke, deklaris, ke la nigrujoj deziras havi la administradon de la landoj de ili loĝataj. En aliaj regionoj, kie la nigra raso estas parto de la loĝantaro, ili deziras la aplikadon de leĝoj protektantaj la rajtojn de la malplimulto. Kiel pruvon, ke la nigra raso tre bone povas mem administri kaj regi sin, s-o Marke citas la nigrujan respublikon de Haitio, kiu cetere jam estas plenrajta membro de la L. d. N., kaj kies delegito, s-o Bellegarde, ministro en Paris, altiris atenton kaj admiron pro elokventeco kaj spriteco.



La Nigra Misio de la L. d. N. en Genève. Bildo „Cellon“ Genève.
De maldekstre al dekstre: s-o G. O. Marke (Liberio), William Le Van Sherill (Ameriko), O' Meally (Kubo), Jean-Joseph Adam (Haitio).

La nigra delegitaro prezentis al la L. d. N. pet-skribon, demandante la nuligon de la fremdaj „mandatoj“ pri la iamaj germanaj kolonioj en Afriko; tiuj mandatoj estu donotaj al la nigrujoj mem, kiuj tre bone estas kapablaj administri landojn de ili loĝatajn; la plej altan kontrolon havus nature la L. d. N.

La „Internacia Asocio por Progreso de Nigrujoj“ (International Negro-Improvement Association), kun centra sidejo en New-York, havas ĉirkaŭ ses milionojn da membroj, senescepte nigrujoj, kiuj troviĝas en ĉiuj partoj de la terglobo.

Hj. Unger.

Persa deklaro pri Esperanto.

ag. Ĉar estis la persa delegitaro, kiu plej energie defendis Esperanton dum la ĵus finiĝinta kunveno de la L. d. N., redaktisto de la Telegrafa Agentejo de la Svisa Gazetaro informiĝis pri la

Grosjean-Maupin, Rue du Val d'Osne 14/S-1, Maurice (Seine), Francujo.

Hankel (S-ino M.), Nicolaistr. 18, Dresden, Germ.

Inglada (Y.), estacion sismologia, Toledo, Hisp.

Krestanoff (I.), Wintergartenstr. 9, Dresden, Germ.

Kühnl (L.), Calle Orfila 5, Madrid, Hispanujo.

Lengyel (P.), Maria Valeria Telep allami uj lakas 32/280, Budapeŝt, Hungarujo.

Lundgrien (J.), Hedemora, Svedujo.

Mann (W. W.), Dreilindenstr. 49, Nikolasse 6, Berlin, Germanujo.

Mazzolini (A.), Reg. Sekola Norm. masch., Via di Cavour, Firenze, Italujo.

Meazzini (E.), San Giovanni Valdarno, Italujo.

Melckebecke (D-ro O.), Avenue de France 22, Anvers, Belgujo.

Ménin (F. de), R. de l'Hôtel de Ville 21, Neuilly s. Seine, Francujo.

Millidge (E. A.), Starcross Midway Sussex Telfham, Anglujo.

Mybs (D-ro), Marktstr. 68, Altona-Hamburg, Germ.

Nylén (P.), Huddinge, Stockholm, Svedujo.

Padfield (W. W.), Cedar Villas 2, Bath, Anglujo.

Parisot (J.), Rue des Brice 6, Nancy, Francujo.

Privat (D-ro E.), Chemin de Roches 2, Genève, Svisujo.

Pulvers (S-ino Ch.), Dornacherstr. 154, Basel, Svisujo.

Reed (Edw. C.), 2518, 17-th St. N. W. Washington D. C., Usono.

Reed (S-ino Ivy Kellerman), ibid.

Rohrbach (D-ro), Galbersweg, Gotha, Germanujo.

kaŭzo. Jen, kion unu el la delegitoj, la Emiro Zoka-ed-Dowleh, ministro en Bern, respondis:

„Ni estas feliĉaj, ke la Intelektula Komisiono de la L. d. N. devas nun ekzameni la demandon tiel gravan de internacia helpa lingvo.

Por la nacioj de Azio, niaj kolegoj de Ĉinio kaj Japanio jam diris al la Komisiono, ke la disvastigo de lingvo praktika kaj facila por la interkomunikado, kiel Esperanto, estas urĝanecese. Oriento kaj Okcidento estas fremdaj intersi, kaj oni devas fari ĉion por alproksimigine nur la diplomatojn kaj intelektulojn, sed ankaŭ la popolojn mem, kiuj ne

ĉiam havas la rimedojn por lerni tri aŭ kvar fremdajn lingvojn.

La Ministerio por Publika Instruado en Persio ankaŭ tre serioze studas la Esperantan demandon en ŝtata komisiono, kaj ni estos feliĉaj, se la Intelektula Komisiono povus tre baldaŭ doni sian opinion. Jam pluraj landoj enkondukis Esperanton en lernejojn, ĉu devige ĉu laŭvole. Por akceladi tiujn decidojn grandskale, certa reciprokeco estas necesa. Jen, kial tiu problemo interesas la Ligon de Nacioj.

Atendante la laborojn de la Intelektula Komisiono, jam estas tre granda sukceseco por Esperanto, ke ĝi estas objekto de riĉe dokumentita raporto, elaborita de la sekretario de la L. d. N. kaj post kelkaj ŝanĝoj unuanime aprobita de la Kunveno de tiu Ligo. Ni dankas ankaŭ al la Internacia Konferenco pri Esperanto ĉe Lernejo, kiu kunvenis en Genève en la Sekretariejo de la L. d. N., kaj al la 16 registaroj tie reprezentitaj. Ni esperas, ke ĝiaj konkludoj iam povos esti adoptitaj tra la tuta mondo en la intereso de la Aziaj popoloj kaj de ĉiuj aliaj nacioj.“

Rollet de l'Isle, Rue du Sommerard 35, Paris, Francujo.

Sabadell (A.), Rembla Cataluna 54, Barcelona, Hispanujo.

Schmid (J.), Müslingweg 2, Bern, Svisujo.

Schmidt (D-ro A.), Telegraphenberg, Potsdam-Berlin, Germanujo.

Schröder (J.), Kaiserstr. 10, Wien VII, Aŭstrujo.

Sebert (Generalo), Rue Brémontier 14, Paris, Franc.

Shafer (S-ino Ad.), Gloucester Crescent, Regents Park, London, Anglujo.

Simon (O.), XIX, Billrothstr. 31, Wien, Aŭstrujo.

Sepulveda-Cuadra (L.), Calle de Madrid 1324, Santiago de Ĉilio.

Stojan (P.), gimn. instr., Novi Bazar, Serbujo.

Stroele (G.), Pierre qui roule 11, Neuchâtel, Svis.

Tellini (A.), Gombrovi 5, Bologna VI, Italujo.

Török (P.), Meŝterstr. 1, Debreczen, Hungarujo.

Utterdyck (D.), Hiacintenlaan 3, Hilversum, Hol.

Underhill (D-ro G.), Idaho Spring, Colorado, Usono.

Verax (Ch.), Boul-d Arago 35, Paris, Francujo.

Villanueva (A. L.), Vergara 11, Murcia, Hispan.

Wackrill (A. E.), Bria dale Gardens 13, Hampstead, London N. W., Anglujo.

Warden (J. M.), Cluny Drive 41, Edinburg, Brit.

Wenger (J.), Côte 113, Neuchâtel, Svisujo.

Witteryck (A. J.), Steenbrugge (Bruges), Belgujo.

Zamenhof (D-ro Leono), Marszałkowska 125, Varsovio, Polujo.

banov, Mancel, Naumann, kiuj verŝajne ne estis atingataj de niaj cirkuleroj kaj leteroj kaj ne devas esti rigardataj kiel ekŝiĝintaj (Regularo VII 9. 19)

Eksigis (sed plejparte voĉdonis): S-oj Anttila, Baruel, Bricard, Carlos, Costa e Almeida, Ferret, Fruictier, Mattov (Generalo), Mikolajski, Pergordo, Polgar, Pujula y Valles, Rusti, Vellen.

Mortis: S-oj Benavente, Evrot, Fauvart-Bastoul, Geyer, Grabowski, Meyer, Noël (D-ro), Ostrowski, Stroele (Hermann), Villaneot, Zakrzewski.

La ceteraj, kies nomoj ne troviĝas en la supraj listoj, jam de longa tempo, malgraŭ ĉiuj petoj, ne respondis la cirkulerojn kaj leterojn. Ili sekve laŭ Regularo VII. 9. 1. devas esti rigardataj kiel ekŝiĝintaj.

Nunaj L.K.-anoj laŭ la lingvoj.

Angla: Blaise (S-ino), Busuttill, Butler, Mann, Millidge, Padfield, Reed, Reed (S-ino Kellerman), Shafer (S-ino A.), Underhill, Wackrill, Warden (=12).

Bohema: Kühnl (=1).

Bulgara: Krestanoff (=1).

Dana — (=0).

Finna — (=0).

Flandra: van Melckebecke, Witteryck (=2).

Franca: Aymonier, Bastien, Bobin, Boucon, Cart, Chavel, Corret, Degon, Delvaux, Flourens (S-ino), Grosjean-Maupin, de Ménin, Parisot, Privat, Rollet de l'Isle, Generalo Sebert, Stroele (G.), Verax, Wenger (=19).

Germana: Arnhold, Behrendt, Bünnemann, Christaller, Fridöri, Hankel (S-ino), Mybs, Pulvers (S-ino), Rohrbach, Schmid, Schmidt, Schröder, Simon (=13).

Greka — (=0).

Hebrea — (=0).

Hispana: Codorniu, Inglada, Sepulveda-Cuadra, Villanueva (=4).

Holanda: Bulthuis, Utterdyck (=2).

Hungara: Lengyel, Török (=2).

Islanda — (=0).

Japana kaj Ĉina — (=0).

Itala: Bianchini, Ghez, Mazzolini, Meazzini, Tellini (=5).

Kataluna: Baemon y Masgrau, Grau-Cazas, Sabadell (=3).

Pola: Zamenhof (Leono) (=1).

Portugala: Beckheuser, Couto-Fernandez, Furtado (=3).

Rumana: Fischer (=1).

Rusa: Devjatnin, Dombrowski, Evstifejeff, Fiŝer, Kabanov, Mancel, Naumann, Stojan (=8).

Sveda: Lundgren, Nylén (=2).

La elektoj en la L.-Komitato okazos dum la unuaj monatoj de 1923, en la Akademion poste, antaŭ la Nürnbergga Kongreso.

Kun kora saluto via tre fidele

Th. Cart,
Prez. de la L.-Komitato.

Prudento!...

Granda franca gazeto „Le Journal“ publikigis lastatempe tiun noton:

„Ĉiu certe rimarkis sur la Paris'aj muroj tiun krete aŭ karbe manskribitan vorton: Esperanto. Nu, ne necesas, esti spertulo pri skriboj kiel Dr. Locard, por konvinkiĝi, ke tiu surskribo estas farita ĉiam de la sama mano.

Ke ĝi estu sur muro de Montparnasse aŭ de La Vilette, ĝi evidente estis skribita de la sama persono.

Kiu estas do tiu apostolo de la Esperantismo, kiu trakuras ĉiujn kvartalojn de Paris, por ke la pasantoj legu la vorton «Esperanto»? Kia kredo! Kia persisto!“

Kore ni danku al „Le Journal“, ke ĝi publikigis tiun simplan noton, anstataŭ mokan artikolon pri nia lingvo!

Spertulo rakontis al mi, ke la vorton «Esperanto» oni trovas ankaŭ sur la reklamo por specialaj kuraciloj, kiu tapetas la Paris'ajn urinojn...

La bela nomo de nia lingvo, la pseŭdonimo de ĝia genia eltrovinto troviĝas do mikŝata kun plej maldecaj desegnaĵoj. Tion, cetere, ne forgesis citi s-o Dumont-Wilden en kontraŭesperanta artikolo aperinta en „La Nation Belge“...

Oni aldonu al tiu ĉi listo la nomojn de la Rusoj: S-oj Devjatnin, Evstifejeff, Fiŝer, Ka-

Jen okazo por ripeti, ke prefere estas havi malamikon ol malspritan amikon! La aluditaĵo surskribito estas signo de fanatikismo; ili malnobligas kaj ridindigas nian movadon.

Kiam, antaŭ kelka tempo, mi volis viziti la „Centran Oficejon“ en Paris, mi venis de la monteto Montmartre, kie staras la preĝejo „Sacré-Cœur“, kaj malsupreniris tra la pentridaj deklivaj stratoj de la artistika kvartalo kaj jen, subite, haltigis min malbebe per kredo skribita vorto „Esperanto“, kiu kvazaŭ anoncis la proksimecon de la Centra Oficejo Esperantista. Jen vangofrapo al serioza Esperantisto!

Simile je tiuj 50 riĉeguloj amerikaj, kiuj, frake vestitaj, propramane balais la straton por protesti kontraŭ senorda urba administrado, mi, se mi estus oficejo de la Centra Oficejo, irus kun ŝtupareto, kun sirelo da akvo kaj kun broso, por protesti kontraŭ fanatikuloj — forigante tiun surskribon! —ng—

Pro la Dekkvina.

Sajne la varsoviaj samideanoj ne povas trankviliĝi pro tio, ke la XV-a ne okazos en illa urbo. Ni opinias, ke estas plej bone nun silenti pri tiu afero, post kiam ĝi estas decidita. Ni konsilas al niaj polaj amikoj kiel eble plej baldaŭ repaciĝi inter si mem, por ke la Esperantistaro povu konfide transdoni al ili la aranĝon de la XVI-a.

Ni represas ankoraŭ leteron de D-ro Em. Loth, direktitan al nia redakcio, sed forstrekinte kelkajn esprimojn, kiuj ŝajnis al ni nebezonaĵoj. Per tio ni fermas la diskuton pri tiu neagraba temo.

Sochaczew, 8. nov. 1922.

Post kelksemajna foresto nur nun mi legis en la 105-a numero de ET la II-an Komunikon de „Federacio de Esp. Soc. en Polujo“. Mi konstatas, ke tiu komunikilo ne povas esti la opinio de la Federacia Estraro, al kiu mi donis detalajn klarigojn pri mia agado en Helsinki, ke pli ĝuste ĝi estas privata atako kontraŭ mia persono.

Mi esperas, ke mallaŭdante tian miksaĵon de Esperanta afero kun personala malsimpatio, mi estos bone komprenata de ĉiuj eliaj Esperantistoj. La atakon mi lasas sen respondo.

D-ro Emiljan Loth,
ing.-kemlisto.

I. L. O.

La „Internacia Labora Oficejo“ kunvokis al Genève la „Internacian Laboran Konferencon“, okazinta de la 18. oktobro ĝis la fino de tiu monato.

Jam en la unua semajno oni aŭdis pri Esperanto. La Komisiono, kiu studas ŝanĝojn rilate al la regularo de la I. L. O. kaj de la Konferenco, ekzamenis la proponon pri oficialigo de la germana lingvo apud la 2 oficialaj lingvoj: la angla kaj franca.

La diskutado estis tre longa kaj multe interesa. La delegito de la franca laboristaro, s-o Jouhaux, forte defendis la germanan lingvon kiel trian oficialan lingvon de la I. L. O. Aliaj energie subtenis lin. Sed — jen venis la hispanoj, italoj kaj eĉ hindoj, kiuj postulis saman rajton por siaj naciaj idiomoj. La registara delegito de Ĉeĥoslovakio, D-ro Stern, pledis por slavaj lingvoj, antaŭvidante la aliĝon de Rusio al la I. L. O. Jen granda embaraso kaj nova Babela Turo!

La reprezentanto de la japana registaro, s-o Adachi, sekve parolis kontraŭ la aliazo de nova „oficiala“ lingvo ĝenerale kaj petis, ke oni restu ĉe la nuna dulingva sistemo, kvankam li plene aprobas la gravan rolon de germana lingvo kaj la altan valoron de germana kulturo. Li atentigis pri la praktika valoro de „Esperanto, neŭtrala internacia helplingvo, konfesante, ke li estas tute favora al tiu idiomu. (S-o Adachi do menciis Esperanton ne por kontraŭbatali la germanan lingvon, sed por eviti multlingvan kaoson!

S-o Adachi partoprenis en la Ĝenerala Kunveno de la L. d. N., kie oni sufiĉe diskutis pri Esperanto kaj adoptis valorajn rezoluciojn.

Kiu pretendas, ke la decidol de la L. d. N. rilate al Esperanto ne estas grava, tiu vidas nun, ke ili tamen influas ne nur la ĝeneralan opinionon, sed eĉ tiun de eminentaj diplomatuloj...

Hj. Unger.

Kosmoglott kaj Occidental.

En ET n-o 89 ni publikigis artikolon de s-o P. Stojan kontraŭ la agmaniero de la societo Kosmoglott en Reval, kaj en n-o 104 t. n. „Justigon“ de tiu societo kun komento nra, ĉar tiam ni ne povis atingi s-on St. pro lia forvojaĝo. Nun ni ricevis rilatan artikolon de s-o P. St., kiun ni ĉi-sekvante publikigas:

„Kuracisto sin mem unue kuracu!“

Iuj perfektigemaj sinjoroj, eldonantoj de folieto „Kosmoglott“, ofendiĝis, ke mi trovis kvar neĝustajojn nur en la subtitolo de la folieto, krome, ke mi notis 6—7 punktojn, ne sufiĉe talente prezentitajn en la folieto. Mi humile petas pardonon de la kosmoglottaj sinjoroj pro mia kritiketo, sed mi nur ilin imitis, ilin, kiuj kritikegas ĉion kaj ĉiujn... krom illa propra kreaĵo, kiun ili opinias ideale perfekta. Dum mi vojaĝis tra maĝara, serba kaj rumana landoj — la ofendito sin „justigis“; nun mi petas permeson de la redaktoro respondi al la justigo.

La ofendito respondas nur pri unu el la 10 punktoj, kiujn mi notis, mi lin petas respondi pri 9 ceteraj! Sed eĉ lia unufanka respondo min ne kontentigas, ĉar tiu sinjorpermeso al si fari novajn malprecizajn asertojn, kiuj ne koincidas

kun la reĝalo. Unu aferon li ĝuste diras: ke la statuto de la societo K. estis registrita en Estonio, kaj tio tute konfirmas mian diron, ke la folieto ne rajtas paroli je la nomo de la vera societo Kosmoglota registrita en Petrogrado (kaj nur tie valida!). Imagu, ke tiu sinjoro registrigis ie en Estonio aŭ Albanio societon kun la sama nomo, kia estas nomo de UEA, ĉu ni ne povus protesti kontraŭ tia socia plagiato? Ĝuste tian proteston mi faris kontraŭ misuzo de nomo de la Petrograda societo „Kosmogloto“ nun fakte ne ekzistanta.

Petro Stojan,
membro de la Lingva Komitato.

Al tiu artikolo ni nenion aldonas. Sed ni devas lomi okupi nin pri artikolo aperinta en la oktobra numero de la folieto „Kosmoglott“. La redaktanto de tiu folieto plendas, ke ni publikigis lian justigon nur 15 semajnojn post ĝia forsendo, kaj li vidas en tio akton de nekorekto kaj particeco. Ni ne publikigis la „justigon“ pli frue: 1. ĉar ni — tute ne konvinkitaj per la „justigo“ — volis antaŭe esplori la aferon sed ne povis atingi s-on Stojan; 2. ĉar la loko en ET tiam ne permesis pli fruan publikigon; kaj 3. ĉar la publikigo de artikoloj (ĉu, kiam kaj kiamaniere) estas nia propra afero.

Plue la red. de „Kosmoglott“ ne komprenas, kial ni metis la vorton „justigo“ inter signojn. Nu, simple por montri, ke ni ne vidas justigon en ĝi.

Fine, la red. de „K.“ skribas, ke — en sia justigo li ne uzis la esprimon „kalumnio“ uzitan de ni en n-o 104; do, li konkludas, tiu esprimo naskiĝis en la subkonscio de la red. de ET, kaj — plua konkludo — „qui s'excuse, s'accuse!“

Kara s-o redaktoro de „Kosmoglott“, ĉu vi fakte forgesis vian programon skribitan leteron de 6. aŭg., en kiu vi mem uzis la esprimon „kalumnio“? Do, tiu esprimo naskiĝis ne en la subkonscio de la red. de ET, sed en via propra ŝajne lomi forgesema cerbo. Por rememorigi al vi vian leteron, ni represas ĝin ĉi-sube laŭvorte, aldonante nian respondon, por ke ĉiu mondlingvano povu konvinkiĝi, ke ni ne estas Esperantistoj pro blinda fanatikeco, sed pro tute realaj kaj raciaj kaŭzoj, kaj ke ĉiu sincera mondlingvano (ĉu Esperantisto, ĉu idlisto, ĉu alisistemano) devas aliĝi al nia sintenado, se li volas, ke entute nia ideo baldaŭ finvenku.

Reval, 6. aŭg. 22.

Al la redakcio de „Esperanto Triumfonta“.

E. S.

Mi sendas al vi alian kopian de nia artikolo, laŭ via informo per karto de la 29. VII. 22. Sed se vi sendis nian artikolon al s-o St. pri klarigo, mi ne komprenas, pro kio vi ne sendis ankaŭ lian artikolon al ni pri klarigo por eviti publikigon de kalumnio?

Estime via
E. de Wahl,
sekretario de „Kosmoglott“

Horrem, 15. aŭg. 1922.

Al Societo „Kosmoglott“
Sokr. s-o E. de Wahl
Niklitinstr. 10
Tallinn.*

Est. Societo!

Vi trovas la respondon de via prezidanto al s-o P. St. en unu el la venontaj numeroj de ET, kiam estas loko, supozeble en septembro Vi ne rajtas riproĉi nin, ke ni ne sendis la artikolon de P. St. al vi antaŭ publikigo, ĉar 1. tio tute estas afero de nia redaktoro, 2. ni opinias, ke ni povis plene fidi je la veremo de s-o St., kaj ankoraŭ nun ni neniel estas konvinkitaj pri liaj ankaj „kalumnioj“, kaj 3. per kunigo de „Kosmoglott“ kun „Occidental“ de s-o de Wahl via societo efektive forlasis la vojon de neŭtraleco, de „libera interaĝo de opinioj pri diversaj sistemoj de mondolingvoj“ kaj fariĝis fakte partia.

Nia ĉefredaktoro mem multe interesiĝas pri perfektigo de mondlingvo: li estas Esperantisto pro tio, ke Esperanto nun havas la preskaŭ ekskluzivan ŝancon el ĉiuj sistemoj por enkondukiĝi, kaj ĉar li opinias, ke por perfektigo, pri kiu oni cetero povas havi tre diferencajn opiniojn, estas ankoraŭ sufiĉe da tempo post enkondukiĝo de Esperanto. Eĉ li mem elpensis novan „perfektigitan“ kaj „perfektigotan“ sistemon de mondlingvo kiun li tamen ne publikigis. Tion ni skribas al vi por montri, ke ni estas sufiĉe largenimaj kaj ne blindaj fanatikuloj. Sed ni volas esti praktikaj laborantoj por la ideo de mondlingvo kaj ne embarasi la mondon per propagando por sistemoj nuntempe senŝancaj.

Via laboro per „Kosmoglott“ supozeble ne domagas al la tuta ideo de lingvo internacia, sed per via kunigo kun „Occidental“, i. e. apogo al difinita sistemo, vi fakte fariĝis „nekroforoj“ („mortoportantoj“), se ankaŭ en alia senco ol s-o St. supozas.

Jen nia vidpunkto.
Benvolo akcepti, est. gesinjoroj, la esprimon de nia altesimo.

Viaj
Esperanto Triumfonta
(subsignis:) Teo Jung.

* Tallinn=Reval.

Juristaro.

Al la tutmonda juristaro.

En la vivo de ĉiuj popoloj la juristoj ludas gravan rolon, kiel gardistoj de l' rajto. Illa laboro limiĝas ne nur je la juĝeja agado; ili estas danke al posedata scienco de publika vivo pli kompetentaj ol aliaj en ĉiuj flankoj de socia agado; tial plej bonaj politikistoj, plej seriozaj publikistoj estas ĉiam: juristoj.

Bedaŭrinde tamen ĝis nun la juriscienca instruado estis ĉiam tro nacia. En universitatoj la alilandaj juro estis ĉiam studata nur iomete kaj estas pro tio forgesata tuj post la ekzamenoj. Dumtempe vivkondiĉoj ŝanĝiĝis kaj nun pure nacia juriscienca ne plu sufiĉas. Iam apenaŭ rimarkebla privata internacia juro nun iĝis grava parto de legoscienca. Fondiĝas novaj statoj, kreiĝas novaj leĝaroj, kiuj devus kontentigi ĉiujn nunkunigitajn popolojn, sed juristoj ne plu estas sufiĉe kompetentaj, ĉar ili estas tial nur en la ŝtato, kie ili studis jurisciencon.

Aliflanke internacia komerco kreskas ĉiutage kaj certe kreskos ĉiam pli kaj pli, ĝi ja estas nuntempe la sola egaligilo de diverslanda ekonomia vivo. Komerco kreas milojn da demandoj pure juraj, kiujn nacia juristaro ne estas kompetenta por solvi.

Ni, juristoj-Esperantistoj, troviĝas en pli bonaj kondiĉoj ol niaj neesperantistaj kolegoj. Ne limigitaj per nacia lingvo, ni ĉiam povos trovi kunlaboranton inter kolegoj de fremda lando ĉu por praktika demando, ĉu por scienca materialo. Por efektiviĝi tiun kunlaboradon ni nur devas organiziĝi, por ke ĉiu el ni sciu, kiuj estas liaj ĉiulandaj kunlaborantoj.

Ankaŭ ofte la juristoj de ia lando, ĉu laborante por krei novan leĝon pri iu speciala vivdando, ĉu kodifikante la leĝojn de ia ŝtato, kliniĝas antaŭ kvazaŭ ne forigebaj malfacilaĵoj, — tute ne sciante, ke en la ŝtato, kies

lingvo ne estas sufiĉe konata fremdlande, en la similaj kondiĉoj oni solvis la saman demandon tute kontentige. La organizacio de Esperantistoj-juristoj povos al ni faciligi la taskon, publikigante, per helpo de siaj membroj ekzemple, novajn gravajn leĝojn de ĉiuj landoj en speciala Esperantilingva bulteno.

Krome per nia internacia jurista organizacio ni devas peni propagandi Esperanton en la internaciaj asocioj de juro kaj de sociaj sciencoj, same kiel eniri ĝin en la internaciaj kongresoj de tiu aŭ alia fakoj de juriscienca.

Do nia tasko devas esti: 1. praktika: unuigo de ĉiuj juristoj, uzantaj Esperanton, por ĉiuspeca praktike profesia interŝanĝo, 2. scienca: elviviĝado de juriscienca Esperanto, 3. propaganda: propagando de Esperanto en juristaj rondoj.

Refleksiĝante pri la formo de nia organizacio, interkonsente kun la Internacia Sciencia Asocio, ni decidis ne fondi ian specialan Asocion de Juristoj, kiu en nia ŝtato de Esperantista movado estus tro malforta, sed aliĝi al la jam forta Internacia Sciencia Asocio, kiel sekcio, same kiel kuracistoj, pedagogoj, teknikistoj ktp.

Laŭ nia scio ekzistas kelkaj centoj da Esperantistoj-juristoj. Ni jam havas adreojn de pli ol 115 konataj Esperantistoj-juristoj.

Ni opinias la Internacian Societon da Esperantistoj-juristoj, kiu, de post la komenco de la mond milito donis nenian signon de vivo, kiel finigitan, kaj ni penos preni sur niajn ŝultrojn la daŭrigon de ĝia agado, petante ĝiajn ĉefojn aliĝi al nia sekcio kaj plifaciligi al ni la taskon per komuna kunlaborado. (La taskon de jura terminologisto promesas akcepti s-o D-ro Walter Lippmann, prokuroro, Leipzig, Germanio).

Ni do invitas ĉiujn kolegojn juristojn-Esperantistojn, same kiel studentojn de juro, kiuj deziras aliĝi al la Jurista Sekcio de Internacia Sciencia Asocio, ke ili komunikoj sian nomon, adreojn kaj profesion al la Sekretario-Kasisto de la Jurista Sekcio de Internacia Sciencia Asocio s-o Józef Litauer, Warszawa (Polio), Marszałkowska 81, sendante al li la kopzon por 1922 al I. S. A., nome: 8 belg. aŭ fr. fr., 4 ŝil., 18 ĉeh. kr. aŭ finn. mark., 16 germ. mark., 60 hung. kr., 10 litov., 1 dolaro, 4 svedaj kr., 5 svisaj fr., 5 danaj aŭ norv. kr., 5 pesetoj, 250 pol. mark., 20 lev., 25 din., 2,5 guld., Aŭstrio kaj baltaĵ landoj 20 germ. mark., 5 yen.

La 5-an de septembro 1922.

La sekcio: Georgo Wilken, advokato, Aleksandrio (Egipto). La Sekretario-Kasisto: Józef Litauer, subprokuroro de Distrikta Tribunalo, Warszawa (Polio), Marszałkowska 81.

Esperanto en bulgaraj lernejoj.

Tiu ĉi lernjaro (1922—1923) estas la unua jaro de aplikado de la nova leĝo de l' Popola Instruado en Bulgario, laŭ kies art. 143 Esperanto estas nedevige instruata en la realaj lernejoj. Kaj tiu unua jaro, kiu estis antaŭita de unu provjaro por ni, la nespertaj en tiu rilato Esperantistoj, promesas tre bonan estonton por nia movado.

Laŭ prezentiĝita de nia Societo listo 45 Esperanto-lektoroj estas jam oficialigitaj de la Ministerio kaj multloke la Esperanto-instruado komencis tre esperige. La dezirantoj lerni Esperanton estas multe pli multnombraj ol pasintan jaron. Ekzemple en la knaba gimnazio en Varna, kie dum la pasinta jaro estis nur unu klaso lernanta internacian lingvon, tiun ĉi jaron estas kvar klasoj, t. e. ĉiuj sesaj klasoj (lastaj de la reallernejoj).

En Dupnica, kie pasintan jaron pro manko de taŭga lektoro mankis Esperanto-instruado en la reallernejo, tiun ĉi jaron dank' al la sindonemo kaj fervoreco de samideano Ljuben Ĉomakov la instruista konsilantaro de la knaba gimnazio decidis devige enkonduki la Esperanto-instruadon en la gimnazio por la sesaj klasoj. Tiun decidon favoris la manko de instruisto por manlaboro, fakto tre sukcese profitigita por la movado de samideano Ĉomakov, kiu estas instruisto en la sama gimnazio. Esperanton instruas niaj samideanoj ankaŭ en du gimnazioj en Vidina distrikto.

Tiuj ĉi faktoj montras, ke ni povas ŝanĝi senbrue kaj nerimarkate la art. 143 de la leĝo de l' Popola Instruado tiel, ke Esperanto fakte estu devige instruata.

La tiulara kurso en la blindula instituto estas neatendite sukcesa — pro postulo kaj insistado de la institutanoj la lingvo estas instruata ankaŭ al malpli aĝuloj, kiuj respondas al progimnazianoj. Lektoro estas nia fervora samideano Panajot Kolev.

En kelkaj gimnazioj estas jam formitaj lernistaj Esperanto-societoj, kiuj propagandas vigle inter la lernantaro. Ĉe la III knaba gimnazio en Sofio estas simila societo kun 37 anoj — ĉiuj lernantoj el unu klaso, kiu pasintan jaron lernis Esperanton. Ĉe la gimnazio en Sevlievo same societo kun 62 anoj.

En Sofio pro manko de sufiĉaj ejoj estas malfarmataj nur du Esperanto-Kursoj por geurbanoj.

Post bruaj diskutoj, la XIII. kongreso de turkaj lektoroj en Bulgario, laŭ propono de samideano Ali Nazmi, voĉdonis rezolucion pri la alpreno de Esperanto kiel fakultativan lernobjekton en turkaj progimnazioj en Bulgario. La lektoroj estas prezentotaj de Bulgara Esperantista Societo.

Pri tiu fakto raportis kelkaj turkaj gazetoj en Konstantinopolo.

D. Simeonov.

Kroata Landa Registaro oficiale akceptas Esperanton.

La prezidanto de la Esperanta Societo en Zagreb ricevis la sekvantan oficialan cirkuleron:

Landa Registaro por Kroatujo
kaj Slavonio.
Departemento por la
Klerigo kaj Konfesioj.

N-o 25252.
1922.

Por preso en la oficiala
organo de la Registaro.

Cirkulero

de la landa registaro por Kroatujo kaj Slavonio, departemento por la Klerigo kaj Konfesioj de 25-a de oktobro 1922, n-o 25252, direktita al tuta instruistaro de Kroatujo kaj Slavonio, per kiu ili estas sciigitaj pri la Manifesto al la tutmonda instruistaro, kiun eldonis Internacia Konferenco de Instruistoj en Genève.

Sekvas la tuta teksto de la manifesto, akceptita en la nomita konferenco de 20. aprilo 1922.

En Zagrebo, la 25-an de oktobro 1922.
Por la landa Vic-reĝo

(—) D-ro Stjepan Bosanac
Reĝa Landa Lerneja Inspektoro.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Esperanto ĉe universitatoj.

Litova Universitato en Kaunas (Kovno) akceptis Esperanton kiel nedevigan fakon en la humanitara fakultato. Kiel lektoro estas invitita s-o P. Medem. La enkonduka propaganda leciono okazis 29. okt. en granda universitata salono. Ĉeestis pli ol 300 studentoj kaj kelkaj profesoroj. Vekiĝis certa intereso.

Regula kurso ĉiusemajna komenciĝis la 5. nov. kun 50 partoprenantoj.

Esperanto-tago en Hradec Králové (Ĉeĥosl.).

La 3. decembro okazas en Hradec Králové la XII-a labora konferenco de orientbohemiaj Esperantistoj. — La Esperantista movado en Ĉeĥoslovakujo estas jam tiom disvastiĝinta, ke ne plu sufiĉas unujara futrespública kongreso, sed estas necese solvi diversajn aferojn propagandajn kaj organizajn dum la regionaj kunvenoj. Post la militigo en aŭgusto 1920 iniciatis samideanoj en Hradec Králové la unuan postmilitan regionan konferencon, kiu decidis plifortigi la kunvenojn tiel, ke de post tiu tempo okazis 11 laborkunvenoj, aranĝitaj se eble ĉiam en alia loko de la regiono. La graveco kaj la utileco de tiaj kunvenoj por nia movado estas senduba, la ĉeestantaro ĉiam pli kaj pli kreskas kaj nia konferencoj fariĝas por ni veraj festoj. Ĝisnuna meznombra partopreno estis ĉirkaŭ 100 personoj; al la hradeca kunveno estas atendataj almenaŭ 150 personoj.

Sabate, la 2. dec., okazos amuza amikvespero kun koncerto, kantol, deklamajol kaj estos prezentata sceno „Serioza ŝerco“, originale verkita por la vespero.

Dimanĉe, la 3-an, antaŭtagmeze amika kunveno en la klubejo de la loka klubo en hotelo „Adalbertinum“, komuna promeno tra la urbo; tagmeze komuna tagmanĝo en la restoracio de la nomita hotelo; posttagmeze la XII-a labora konferenco en la salonego de la Urba Industria Muzeo; vespere amika kunveno en „Adalbertinum“.

Specialaĵo de la tago estas „Libra Foiro“ zorgo preparata; bone sciante, ke oni multon aĉetus, se oni nur scius kie kaj kiamaniere, la prepara komitato petis la ĉefajn eldonejojn alsendi la plej gravajn verkojn en pluraj ekzempleroj, la aliajn po unu ekzemplero; la partoprenantoj havas bonan okazon vidi, kio nuntempe estas aĉetebla kaj mendi ĉe la „Foiro“ ĉion laŭplaĉe.

Perfekta vagonara komunikilo kun Hradec Králové de ĉiuj direktoj, zorgaj preparoj de la loka komitato kaj la ĝenerala intereso pri la orientbohema Esperantista vivo garantias multnombrian partoprenon kaj plenan sukceson de la entreprenon.

La detalan programon sendas laŭ deziro O. Sklenčka, delegito de UEA en Hradec Králové.

La plano de ET.

Racia eluzo de ĉiuj eblaj cirkonstancoj por la profito de la abonantoj. — Racie laboranta entreprenon estas nesckuebla. — Aldono de ĉiusemajnaj revuoj al ET. — Neniu serioza Esperantisto sen ET. — Semajna ĵurnalo, kvar revuoj kaj romano por unusola ĵarabono! — Klion dros la legantoj de ET?

En n-o 108 mi jam aludis planon pri aldono de ĉiusemajnaj revuoj al ET laŭ formo de la „Revuo“ aperinta unufoje kun la Nürnberg-numero. Hodiaŭ mi volas pli detale skizi tiun planon, kia ĝi evoluis lastatempe en mia cerbo.

ET fariĝis en la mallonga tempo de sia ekzistado jam la plej grava gazeto Esperantista. Tion ĝi dankas al sia nepre regula, seninterrompa ĉiusemajna aperado kaj al sia ĝidateco laŭ raciaj deficiton evitantaj principoj. Tamen, unuflanke ĝi ne iam estas perfekta kaj bezonas ankoraŭ plibonigon; aliflanke, por plibonigi ĝi bezonas pli altajn abonkotizojn aŭ pli multe da abonantoj. Ĝis nun sufiĉis, ĉe la nunaj abonkotizoj, 3000 abonantoj por vivteni ET kaj eĉ garantii profiton, sed kiam la por ET favoraj valutaj cirkonstancoj ĉesos (kaj ili certe iam ĉesos), 3000 abonantoj ne sufiĉos, kaj mi bezonos minimume 4-5000, se la nunaj abonkotizoj ne plialtiĝu.

Kial ET akiris ĝis nun ne pli ol 3000 abonantojn? Ĝis nun pro tio, ke ekzistas ankoraŭ multaj samideanoj, por kiuj ET ĝis nun ne fariĝis nepre necesaĵo. Tion atingi, estas nun mia ĉefa zorgo. Mi esperas ĝin atingi per aliaranĝo (perfektigo) de ET, precipe per aldono de ĉiusemajnaj aldonoj aŭ revuoj: pri komerco kaj ekonomio, pri tekniko kaj populara scienco, pri literaturo kaj arto, pri kulturo kaj homaraneco, pri bonhumoro (spritaĵoj) kaj eventuale ankoraŭ aliaj. Tiamaniere mi ankaŭ racie eluzos preskaŭ plene la cirkonstancojn: ĉe la unuope ekspeditaj ekzempleroj la afranko restos la sama (ĝis 50 gramoj) malgraŭ la pliampleksiĝo; la redaktado, administrado kaj ekspeditado kaŭzos relative malgrandajn plikostojn.

La ĉefan utilon per tio havos la Esperantistaro mem: la plena racia eluzo de ĉiuj eblaj cirkonstancoj garantias plejble grandan servon (niaflanke) je plejble malgrandaj kostoj (por la abonantoj), kaj ĉiu plua malpliigo de la kostoj dependos ekskluzive de la kreskado de l' abonantaro kaj, fine, ankaŭ de la anoncoj, kiuj per si mem pliĝos kun la kreskado de la abonantaro kaj kun la pliserioziĝo de nia tuta movado. Cetere, tiamaniere racie laboranta entreprenon jam ne estos skuebla.

Do jen mia plano:

La enhavo de ET estu aranĝata pli super-rigardebla ol ĝis nun, almenaŭ la kroniko (tiun deziron esprimis jam kelkaj legantoj).

